**PERSONO 1**

1. Naskiĝis en 1564 kaj mortis en 1642
2. Estis tre grava itala sciencisto
3. Estis fondinto de moderna scienco (kun Bacon kaj Descartes)
4. Li ŝancelis la mondbildon de la Okcidento
5. En 1593 li inventis termometron
6. En 1604 li malkovris la leĝon de falantaj objektoj
7. Konfirmis la suncentrisman teorion proponita de Koperniko
8. Estis la unua homo kiu uzis la teleskopon por vidi la ĉielon
9. La eklezio konstraŭstaris lin kaj komdamnis lin en 1633 nei la Kopernikan sistemon.
10. Li estis malliberigita en sia domo kaj tie, blinda, li loĝis ĝis la fino de sia vivo kun sia filino

**PERSONO 2**

1. Naskiĝis je la 12-an de februaro 1809 kaj mortis la 19-an de aprilo 1882
2. Estis angla sciencisto, kiu fondis la teorion de evoluismo
3. Lia plej grava verko nomiĝas *Origin of Species* ("Origino de Specioj") eldonita en 1859.
4. Kune kun la genetika teorio de la aŭstra monaĥo Mendelo pri la heredado de trajtoj, lia teorio preparis la grundon por la moderna scienca biologio.
5. Lia teorio skuis la kristanan fidon de la Okcidento kaj li mem perdis sian fidon kaj mortis kiel nekredanto
6. Post lia morto, lia evoluismo naskis en politikaj kaj ekonomiaj rondoj la tiel nomatan socian darvinismon, kiu aplikis iujn principojn derivitajn el la biologia teorio al sociaj rilatoj inter homoj
7. En religiaj rondoj (precipe ĉe protestantismo, kaj ĉefe en Usono) oni perceptis lian teorion kiel atakon kont-raŭ la Biblio
8. Stariĝis movado kontraŭa al liaj ideoj nomata kre-ismo, kiu proponas la unuan ĉapitron de la Biblio kiel seriozan sciencon
9. Li devenis el riĉa familio kiu fabrikis ceramikajn potojn por la burĝaro
10. Liaj plej fekundaj esploroj estis faritaj en la insuloj de Galapago

**PERSONO 3**

1. Naskiĝis en 1642 kaj mortis en 1727
2. Brita sorĉisto, alkemiisto, numerologo, mate-matikisto kaj fizikisto
3. Li eltrovis la tri leĝojn de fizika movo
4. Li eltrovis la leĝon de universala gravito
5. Li inventis la reflektantan teleskopon
6. Lia fiziko, la klasika mekaniko, staris sen defio ĝis la $20^{a}$ jarcento, kiu vidis la alvenon de la fiziko de Ejnstejno kaj la kvantuma mekaniko
7. Lia patro estis senalfabeta kaj mortis antaŭ lia nasko
8. Laŭ legendo, lia plej fama eltrovo estis farita kiam li estis sidanta sub pomujo kaj li estis frapita de pomo sur la kapo.
9. Sur la mortolito, li rifuzis la anglikanan sakramenton.
10. Lia fiziko klarigis la astronomion de Koperniko kaj Keplero

**PERSONO 4**

1. Naskiĝis en 1469 kaj mortis en 1527
2. Estis eminenta politika filozofo de renesanca Florenco
3. Estas la aŭtoro de *La Princo* (1513), manlibro por la regnestro, en kiu li konsilis la princon agi eĉ hipokrite kaj malmorale por savi kaj rosperigi sian regnon
4. Li estis filo de malnobla leĝisto kaj bienisto
5. En 1498, li, tiama malnoblulo, fariĝis alilanda sekretario por la respubliko
6. En 1512, la respubliko falis kaj li estis malliberigita. Torturinte lin kaj ne trovinte kulpon en li, oni fine liberigis lin.
7. Spite de lia konsilo al princoj, li mem ne havis glacian kaj kruelan koron. Li estis amikema, sprita kaj grandanima
8. Li ŝatis legi pri historio kaj amo, la du pasioj de lia vivo estis politiko kaj virinoj.
9. Li verkis ankaŭ komediojn kaj poezion
10. Junaĝe li estis arda respublikano, kiu deziris la liberecon de Florenco, en maljunaĝo li estis arda naciisto, kiu deziris la liberiĝon de Italio de fremduloj.

| PERSONO 5 | PERSONO 6 |
|---|---|
| **1.** Naskiĝis en 469 kaj mortis en 399 a.K.<br>**2.** Estis greka filozofo kiu interparoladis kun junulojn en la stratoj, gimnastikejoj, kaj en la agoro de la antikva Ateno<br>**3.** Li inventis la dialogon kiel metodon por malkovri la veron<br>**4.** Li mem ne verkis, sed poste, Platono, lia disĉiplo, uzis dialogojn en siaj verkoj.<br>**5.** Laŭ li, multe gravas ekzameni la vivon.<br>**6.** Li batalis kiel hoplito en la Peloponesa Milito<br>**7.** Li havis edzinon, Ksantipan, kaj tri filojn.<br>**8.** La ĉefaj fontoj pri lia vivo estas la verkoj de Platono, Aristofano, Ksenofono<br>**9.** Kiam li aĝis 70 jarojn, la Atenanaj juĝistoj lin akuzis de blasfemo kaj de junulara korupto. Ili donis al li la mortkondamnon. Anstataŭ defendi sin, aŭ ekzili sin, li alprenis sian kondamnon, trinkante cikuton<br>**10.** Li, kiu kredis je la senmorteco de la animo, ne timis la morton. Li diris, ke la juĝistoj, pro ne ekzameni siajn vivojn, jam estis mortaj. | **1.** Vivis de 429 a.K. ĝis 347 a.K.<br>**2.** Li estis tre grava greka filozofo de Ateno<br>**3.** Li estis fondinto de platonismo<br>**4.** Li estis la plej fama sekvanto de Sokrato<br>**5.** La filozofio de kristanismo kaj de la Okcidento inter 400-1250 estis plejparte bazita sur liaj ideoj<br>**6.** Li instruis Aristotelon<br>**7.** Li fondis la Akademion<br>**8.** Lia ĉefa verko estas la *Respubliko* (greke, *Politeia*).<br>**9.** Lia fama ilustraĵo pri la Ideoj estas la Parabolo de la Kaverno<br>**10.** Inter liaj sekvintoj estas: Cicerono, Plutarko, Marko Bruto, Plotino kaj Aŭgusteno |
| **PERSONO 7** | **PERSONO 8** |
| **1.** Vivis de 1818 ĝis 1983<br>**2.** Estis filozofo el Germanio kiu fondis la skolon de marksismo<br>**3.** Estis kritikanto de kapitalismo<br>**4.** Li estis juda laŭ etno, luterano laŭ religio, ateisto laŭ kredo, germana laŭ naskiĝo kaj brita laŭ lando<br>**5.** Li loĝis malriĉe kaj sen posteno en Londono kun sia familio<br>**6.** Li estis materialisma, kredinte ke historio kaj ĉiu ago de homo estas bazita, rekte aŭ nerekte, sur la materia stato de homo, alivorte sur la ekonomio<br>**7.** Lia bildo de la estonta mondo estas de justeco kaj venĝo por la malriĉularo<br>**8.** Li vidis ĉion kiel lukton inter kontraŭuloj, lukto kiu finiĝas post tempo en nova, plibona sintezo<br>**9.** Li vidis historion kiel lukto inter klasoj<br>**10.** Liaj ideoj estis disvastigitaj en okcidenta Eŭropo precipe kiel socialismo | **1.** Nakiĝis en 1957<br>**2.** Estas araba revoluciisto<br>**3.** Batalas sanktan militon por la islama mondo<br>**4.** En la 1980aj jaroj li batalis kontraŭ la komunista Sovetunio por forpuŝi ĝin de Afganistano<br>**5.** Lastatempe batalas kontraŭ Usono por forpuŝi ĝin el la islama mondo<br>**6.** Li deziras la unuiĝon de ĉiuj islamaj landoj en unu imperion<br>**7.** Li jam faris kelkajn bombatakojn en Afriko kaj Usono<br>**8.** En la 11$^{a}$ de septembro 2001 li estris teroristan atakon per sinmortigantoj kontraŭ la Pentagono en Vaŝingtono kaj la Ĝemelturoj en Novjorko, Usono<br>**9.** Estis ĉirkau 3000 mortintoj pro lia lasta atako<br>**10.** Estas la estro de la terorista organizo La Bazo (arabe, *al-Qaeda)* |

**PERSONO 9**

1. Estis brita reĝisoro, produktoro, aktoro, scenaristo kaj humuristo
2. Naskiĝis la 16-an de aprilo 1889 en Londono
3. Mortis la 25-an de decembro 1977 en Vevey, Svisio
4. Kiel aktoro, li plej ofte ludis la rolon de persono apartenanta al malsupra socia tavolo, kiu ruze defendas sian pozicion kontraŭ la riĉuloj kaj potenculoj
5. Eble lia plej fama filmo estis *Modern times* farita en Usono en 1936
6. Lia lasta filmo estis *The countess from Hong Kong* farita en Britio en 1967
7. Li arde kritikis Hitleron en la filmo *The great dictator* farita en Usono en 1940
8. En 1925 li rolis en *The gold rush* farita en Usono en 1925
9. Li ofte krikitis la socion kaj la estroj en siaj filmoj
10. Li estas plej konata kiel aktoro kaj humuristo

**PERSONO 10**

1. Ŝi naskiĝis la 1-an de junio 1926 en Losanĝeleso, Kalifornio
2. Ŝi mortis en sia naskurbo la 5-an de aŭgusto 1962
3. Ŝi edziniĝis en sia deksesa jaraĝo
4. Post la edziniĝo ŝi eklaboris en aviadilfabriko
5. Ŝi fariĝis fotomodelo, blondigis siajn harojn kaj baldaŭ estis malkovrata de filmentre-prenistoj
6. Ŝian pseŭdonimon ŝi ekuzis en 1948, kiam ŝi unuafoje subskribis filmkontrakton
7. Ŝia vera nomo estis Norma Jean Mortensen
8. Ŝia roloskemo ĉiam estis la sama: bela, naiva kaj sekse alloga
9. En la aĝo de 36 jaroj ŝi mortis pro troa dozado de dormigiloj
10. Ŝi kantis "*Gratulon al vi*" en la datrevena festo por la tiama prezidanto de Usono, JFK

**PERSONO 11**

1. Li vivis inter 1928 kaj 1999
2. Li naskiĝis en Usono
3. Li estis la direktoro de la filmoj *2001, Dr Strangelove, Lolita, The Shining* i. a.
4. Liaj filmoj sukcesis komerce kaj arte
5. Li loĝis kaj laboris en Britio ekde la 1960aj jaroj
6. En sia junaĝo anstataŭ esti studento ĉe universitato, li fariĝis fotisto por la magazino *LOOK* kaj fanatiko pri la kino
7. Lia unua grava filmo, *Fear and Desire* ("Timo kaj Deziro") ruinigis lian geedziĝon
8. Spartacus estis la plej granda filmo de Hollywood kiun li direktis
9. Li vidis filmon pli kiel muzikon ol fikcion
10. Lia lasta filmo estis 1999: *Eyes Wide Shut* ("Okuloj Laŭlonge Fermitaj")

**PERSONO 12**

1. Li vivis en la mezepoko inter la jaroj 1265 kaj 1321
2. Li estis fama itala poeto de Florenco
3. Verkis la poemon *La Divina Commedia*
4. Lia ĉefa verko priskribas vojaĝon tra infero, purgatorio kaj paradizo.
5. Li naskiĝis en familio nobela sed malriĉa, kiel multaj de daŭranta famo
6. Li batalis en la batalo de Campaldino kontraŭ la Gibelinoj
7. Li arde studis filozofion, teologion kaj provencan poezion por eviti sian malĝojon post la morto de Portinari
8. Li mortis en ekzilo en Ravenna en 1321
9. Lia plej konata verko estas poemo de 14 mil versoj, krio kontraŭ la morala aĉeco de la mondo
10. Li efektive montris ke nacilingvo, kaj ne sole la latina, povas esti efika kaj belega ilo de alta literaturo

| PERSONO 13 | PERSONO 14 |
|---|---|
| **1.** Li vivis inter 1564 kaj 1616<br>**2.** Li naskiĝis en Anglio<br>**3.** Li estas taksita kiel plej bona aŭtoro de la angla lingvo<br>**4.** Li estas taksita unu el la plej bonaj poetoj de la mondo<br>**5.** Kiel tragediisto, nur la antikvaj grekoj estas egalaj al li<br>**6.** Kiel kultura kaj lingva fonto en la anglelingva mondo, nur la Biblio estas super li<br>**7.** En 1595 li verkis *Romeo & Juliet*-n<br>**8.** En 1603 li verkis *Hamlet*-n<br>**9.** En 1604 li verkis *Othello*-n<br>**10.** En 1605 li verkis *King Lear*-n | **1.** Li vivis inter 1892 kaj 1973<br>**2.** Li estis filologo kaj profesoro de Oksfordo<br>**3.** Li verkis romanojn de fantazio, kreis mitologion<br>**4.** Por sia mondo, li inventis lingvojn, historion, landojn, reĝojn, heroojn, mitojn, kantojn kaj kreitaĵojn<br>**5.** Lia ĉefa verko estas La Mastro de l' Ringoj (*The Lord of the Rings*)<br>**6.** Li naskiĝis en Sudafriko en la urbo Bloemfontein<br>**7.** Post la morto de sia patrino, li estis en la zorgo de katolika pastro kaj fariĝis fervora katoliko<br>**8.** Li lernis esperanton 17-jaraĝe<br>**9.** En Esperanto kaptis lian atenton ne la strukturo (gramatiko, reguloj, ktp) sed kontraŭe, la estetiko (sonkombinoj, la "melodio" kaj poezieco) de lingvoj.<br>**10.** Li estis lingvoamanto kaj sciipovis plurajn el ili |
| **PERSONO 15** | **PERSONO 16** |
| **1.** Li vivis inter 1888 kaj 1935<br>**2.** Li naskiĝis en Lisbono, Portugalio<br>**3.** Li strebis por renovigi la portugallingvan literaturon helpe de la kreado de la revuo "*Orpheu*"<br>**4.** Li frue mortis en 1935<br>**5.** Li havis la kapablon "aliuliĝi"<br>**6.** Li kreis diversajn heteronimojn kaj respektivajn personecojn apartenantajn al ili<br>**7.** Alberto Caeiro estas unu el liaj heteronimoj<br>**8.** Li verkis ankaŭ en la angla lingvo<br>**9.** Li estas taksita kiel unu el la plej gravaj portugallingvaj poetoj<br>**10.** Álvaro de Campos estas unu el liaj heteronimoj | **1.** Li naskiĝis en Póvoa de Varzim, Portugalio kaj mortis en Parizo, Francio<br>**2.** Li vivis inter 1845 kaj 1900<br>**3.** Li studis Juron ĉe la Universitato de Coimbra<br>**4.** Li estis rajtigita kiel diplomato kaj estis en Egiptio, Kubo, Londono (Britio), Parizo, i.a.<br>**5.** *O Crime do Padre Amaro* (La Krimo de la Pastro Amaro 1875-1876) estas inter liaj ĉefaj verkoj<br>**6.** *O Primo Basílio* (La Kuzo Basilio –1878) estas unu el liaj ĉefaj verkoj<br>**7.** Li tradukis la romanon de Rider Haggard, "La Minoj de Rego Salomono"<br>**8.** Li estas eble la plej grava portugala romanisto de la 19-a jarcento<br>**9.** *Os Maias* (La Familio Maia de 1888) estas unu el liaj elstaraj verkoj<br>**10.** En 1887 li verkis *A Relíquia*-n (La Reliko) |

| PERSONO 17 | PERSONO 18 |
|---|---|
| **1.** Li naskiĝis en Lisbono, ĉirkau 1524<br>**2.** Devenis el nord-portugala familio<br>**3.** Lia onklo estis pastro en monaĥejo<br>**4.** En Coimbra ĉeestis universitat-lecionojn pri Hom-sciencoj<br>**5.** En 1572 danke al la influo de amikoj li sukcesis publikigi sian ĉefan verkon<br>**6.** Lia ĉefa verko nomiĝas La Luziadoj (*Os Lusíadas*), kaj estas fama portugala popola eposo<br>**7.** Li mortis en Lisbono la 10-an de junio 1580<br>**8.** Lia verko staras inter Klasikismo kaj Baroko.<br>**9.** Li skribis gravan kvanton de sia verkaro en Barato, tiama Hindio<br>**10.** Kelkaj lin konsideras la plej grava portugala poeto | **1.** Vivis inter 1920 kaj 1992<br>**2.** Li estis aŭtoro de sciencfikcio<br>**3.** Li verkis centojn da libroj pri scienco por la laikaro<br>**4.** Lia famo devenas de siaj noveloj kaj romanoj pri robotoj, la serio *Foundation* (historio pri la estonta galaksio), kaj la novelo *Nightfall* (Noktiĝo)<br>**5.** Li naskiĝis en Rusio de Lenino, sed plejparte de sia vivo loĝis en Novjorko<br>**6.** Post Sputniko, de 1957 ĝis 1982, li skribis precipe por popularigi sciencon<br>**7.** Post 1958, li verkis ĉirkaŭ 500 librojn<br>**8.** En lia fikcia mondo la robotoj devis obei la tri leĝojn de robotiko: *Roboto ne difektigu homon aŭ, per senagado, lasu homon difektiĝi; Roboto devas obei ordonon donitan al ĝi de homo, krom se la ordono kontraŭ diras la Unuan Leĝo; Roboto devas gardi sian ekzistecon, krom se tio kontraŭas la Unuan aŭ Duan Leĝon*<br>**9.** Lia sciencfikcio skize kaj hazarde priskribas la venontajn 23 mil jarojn da historio<br>**10.** Li laboris kiel profesoro de biokemio ĉe la Universitato de Boston de 1949 ĝis 1958, esplorinte pri nukleacido |
| **PERSONO 19** | **PERSONO 20** |
| **1.** Ŝi estas la ora diino de beleco, amo kaj deziro<br>**2.** Ŝi estas la filino de Zeuso kaj Diono<br>**3.** Festivaloj omaĝantaj ŝin estis tre popularaj en Ateno kaj Korinto<br>**4.** Kiam Pariso devis elekti en konkurso la plej belan de la diinoj, ŝi venkis Hera-on kaj Atena-on<br>**5.** La kolombo, la cigno, kaj la pasero estis ŝiaj birdoj<br>**6.** Laŭ Heziodo, ŝia nomo venas de la greka vorto *aphros* (ŝaŭmo)<br>**7.** Laŭ Heziodo, ŝi naskiĝis jam matura de la maro de la generaj organoj de Urano<br>**8.** Kiel *Urania*, ŝi estas la diino de la ideala amo. Kiel *Benetrix*, ŝi protektis geedzecon. Kiel *Porne*, ŝi estis la diino de la volupto, kaj ŝi protektis la amoristinojn<br>**9.** Ŝi fariĝis patrino de Dejmoso (teruro), Foboso (timo), Harmonia, kaj Eroso<br>**10.** Eroso, la juna dio de amo, estis ŝia filo | **1.** Latine konata kiel *Neptunus*<br>**2.** Estas la frato de Zeuso kaj Hadeso<br>**3.** Li loĝas en la maro, kie li estas estro, sed ofte li vizitas la teron kaj la ĉielon<br>**4.** Lia armilo estas la tridento<br>**5.** Rajdas la ondojn en ĉaro tirigita de delfenoj<br>**6.** Foje, volis esti la dio de la urbo Ateno<br>**7.** Ofte li skuas la teron per sia kolero<br>**8.** Li facile povas ŝanĝi sian formon<br>**9.** Kreis la ĉevalon kiel donacon por la Atenanoj<br>**10.** Ofte konata kiel dio de la maroj |

| PERSONO 21 | PERSONO 22 |
| --- | --- |
| **1.** Neniu scias certe lian naskiĝdaton, sed laŭ teorio, li naskiĝis en la jaro 1513 a.K.<br>**2.** En la regiono de la Sinaj, li ricevis la Dek Ordonojn de Dio, eble la plej grava morala kodo por la homaro<br>**3.** Post lia naskiĝo li estis forlasita en la rivero Nilo<br>**4.** Li vivis en Egiptio malgraŭ tio ke li estis judo<br>**5.** Li gvidis la judajn sklavojn de Egiptio tra la dezerto direkte al Izraelo<br>**6.** Li rifuzis esti nomata filo de filino de faraono<br>**7.** En la Malnova Testamento troviĝas liaj kvin libroj<br>**8.** Lia vivo estis ĉefe dediĉita al la serĉo de la promesita lando<br>**9.** Li mortis post 40 jaroj en la dezerto<br>**10.** Li kreis bazajn sociajn regulojn por lia popolo | **1.** Li vivis en la jarcento VIa a.K.<br>**2.** Li estas grava ĉina filozofo<br>**3.** Li aŭ liaj sekvintoj skribis la libron Daŭdeĝingo (ĉine: Dao De Jing), "La sankta skribo pri la Vojo kaj la Virto"<br>**4.** Li fondis taoismon, unu el la tri ĉefaj religioj de tradicia Ĉinio (kune kun budhismo kaj konfuceismo)<br>**5.** Li kaj lia doktrino profunde influis la ĉinajn pensmanieron, arton kaj spiriton<br>**6.** Budhismo interpretita laŭ lia doktrino fariĝis zenismo<br>**7.** Li estis samtempulo de Konfuceo<br>**8.** En maljunaĝo, li malkontentis pri la mondo de homoj kaj foriris okcidenten, rajdante sur la dorso de nigra bovo<br>**9.** Li estis malaltranga oficisto de la regno Gou en la urbo Luojango<br>**10.** Laŭ legendo, li iris al Hindio kaj instruis princon |
| **PERSONO 23** | **PERSONO 24** |
| **1.** Li vivis inter 563 kaj 483 a.K<br>**2.** Li naskiĝis en la ĝardeno Lumbini en suda Nepalo<br>**3.** Laŭ la tradicio, lia patro estis reĝo aŭ princo<br>**4.** Li june edzinigis Yasodhara, kaj havis filon, Rahula<br>**5.** Li foriris de la reĝa palaco 29-jaraĝe<br>**6.** Li vivis dum ses jaroj kiel senhejma asketo, serĉante la solvon al la problemo de la homa sufero<br>**7.** Li trovis la lumiĝon (*maha bodhi*) sub la bodhi-arbo en Bodh Gaya, Biharo Stato, Barato<br>**8.** Li instruis al siaj disĉiploj sian doktrinon - la "Meza Vojo" inter la ekstremoj de asketismo kaj hedonismo<br>**9.** Li diris ke, la karakterizo pli elstara de la homa situacio estas la doloro, devena de nia malfacilaĵo alfronti la fakton, ke ĉio nin ĉirkaŭanta estas nekonstanta kaj pasonta<br>**10.** La Nobla Oktobla Vojo proponita de li por estingi la suferon konsistas el: ĝusta vivado, ĝusta konado, ĝusta parolo, ĝusta konduto, ĝusta laboro aŭ profesio, ĝusta penado, ĝusta regado de la menso, ĝusta meditado. | **1.** Laŭ la judoj, li estis falsa kaj blasfemata profeto kiu sorĉis kaj logis judanojn for de judismo<br>**2.** Laŭ la gnostikoj, li estis nek Dio nek homo sed Sendinto de Lumo de Dio. Lia misio estis transdoni al ni sekretan scion (greke, *gnosis*), por liberigi nin de iluzio kaj de ĉi tiu koruptita mondo.<br>**3.** Laŭ la islamanoj, li estis sankta profeto de Dio kaj faris miraklojn, sed li ne estas Dio aŭ filo de Dio<br>**4.** Laŭ la bahaanoj, li estis unu el la naŭ mesaĝistoj de Dio kaj li venis duan fojon en Bahá'u'lláh, la fina profeto<br>**5.** Laŭ la modernistoj, li eble eĉ ne ekzistis sed estis mito inventita kaj kredita de naivaj kamparanoj.<br>**6.** Laŭ la katolikistoj, li estas Dio kiu enkorpiĝis por savi la mondon forigante la pekon de la homaro<br>**7.** Laŭ la spiritistoj, li estas la spirita estro de Tero kaj enkarniĝis por helpi la homoj savi sin mem<br>**8.** Paŭlo de Tarso fondis Kristanismon bazita sur lia vivo ekzemplo<br>**9.** La Nova Testamento pritraktas lin<br>**10.** Juĝata kulpa, li estis mortigita sur kruco de soldatoj de Romio. Kiam li mortis, la ĉielo estis mallumiĝinta |

| PERSONO 25 | PERSONO 26 |
|---|---|
| **1.** Lia naskiĝtago estis la 3-a de decembro laŭ la julia kalendaro kaj la 19-a de kislev, laŭ la juda<br>**2.** En la 1890-aj jaroj, li inventis skribmaŝinon<br>**3.** Ĝis la 1-a Mondmilito, li laboris kiel okulkuracisto por vivteni sian familion<br>**4.** Li estis judo. Sub la influo de Hilelo, li fondis *hilelismon*, aŭ homaranismon<br>**5.** Liaj tri gefiloj estis mortigitaj de la nazioj: lia filo Adamo de la polico en Varsovio sub ordono el Berlino; kaj liaj du filinoj, Lidja kaj Sofia, en la gasĉambro de Treblinka en 1942<br>**6.** Li studis medicinon en Moskvo kaj Varsovio<br>**7.** Li naskiĝis en Bjalistoko, Rusa Imperio, en 1859<br>**8.** En 1887 li eldonis libreton, kiu prezentis la lingvo-projekton "Lingvo Internacia"<br>**9.** Li mortis en 1917<br>**10.** En 1905, en Francio, li faris memorindan paroladon kadre de la unua universala | **1.** Naskiĝis la 26-an de februaro 1802 en Besancon, Francio<br>**2.** Mortis la 22-an de majo 1885 en Parizo<br>**3.** Estis fama reprezentanto de la franca romantikismo<br>**4.** Estis membro de la *Académie Francaise* (Franca Akademio)<br>**5.** Ankaŭ estis politike aktiva<br>**6.** Kiel kontraŭulo de Napoleon III li pasigis la jarojn inter 1851 kaj 1870 eksterlande<br>**7.** En 1827 li verkis la dramon *Cromwell*<br>**8.** En 1862 li verkis la romanon *Les misérables* (La mizeruloj)<br>**9.** En 1831 li verkis la romanon *Notre-Dame de Paris*<br>**10.** Li estas verŝajne la plej konata franca verkisto |
| **PERSONO 27** | **PERSONO 28** |
| LIBERA LOKO | LIBERA LOKO |

# Ideoj de la redaktoro koncerne la uzon de la ludo:

Preparlaboro:
La informkartojn ni konsilas elprinti, eltondi kaj surglui al pli dika kartoneca papero, por ke dum la ludo ili ne detruiĝu. La divenendan personojn ni ne indikis sur la kartoj, ja eblas, ke oni volas uzi la ludon por aliaj celoj, kiam tiu indiko forprenus la celon de la ludo. Se vi tamen volas la solvon indiki, alskribu ĝin mane, bonvolu.
(Eblas indiki ĝin ankaŭ sur la dorsa flanko de la kartoj aŭ/kaj alglui ankaŭ portretojn. Sed atentu, en tiu kazo oni eble povas tuj vidi la solvon! La paĝon kun la portretoj eblas peti de la redaktanto@edukado.net. )
Por tiuj, kiuj multe uzos la ludon valoras enplastigi la kartojn.

La ludo povas disvolviĝi divermaniere, bezonatas minimume du personoj.
La esenco estas ke unu el la ludpartneroj (A) ricevas/tiras unu karton.
La alia (B) diras ciferojn laŭvice inter 1 kaj 10 (kiuj korespondas al la numero de la infrormoj). La koncernajn informojn la ludanto A laŭtlegas kaj ludanto B povas diveni la demandatan PERSONOn. Se divenas ĝin el unu informo, ricevas 9 poentojn, se el du, li/ŝi ricevas 8 poentojn, ktp.
Dum la ludo la ludanto B eble erare diras la nomon de la PERSONO. En tiu kazo ni kosilas forpreni ĉiukaze du pun-poentojn. Tiel oni pripensas, ĉu valoras riski perdon de poento, aŭ oni volas iri ĝis certeco kaj peti plian informon. Ĉar temas unuavice pri lingvoekzerciga ludo kaj nur duavice pri kulturludo, ni klopodu atingi ke kiel eble pli da demandoj estu legataj.
Kiam unu karto estas finita, la ludpartneroj interŝanĝu la rolojn de la demandanto kaj la respondanto kaj tiru alian karton.
Oni difinu komence kiom longe daŭru la ludo, aŭ maksimume kiom da kartoj estu tirataj de unu persono.
Estas utile:

- fari leksikan preparon por la ludo, pritrakti la plej oftajn kaj gravajn vortojn kaj esprimojn, ripeti esprimojn kiuj povas rilati al rpezento de biografio de iu.
- havi ĉemane ankaŭ leksikonon kaj tuj serĉ(ig)i la koncernan PERSONOn, kompletigi la informojn, nacilingve legatajn laŭeble en E-o.

Je pli alta nivelo oni povas uzi la ludon kiel enkondukon al temo pri unu konkreta kulturo. Povas esti "hejmtasko" pretigi similan karton kadre de elektita temo: bestoj, objektoj ...

### Solvoj por la PERSONO-kartoj

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 | Galileo Galilei | 10 | Marilyn Monroe | 19 | Afrodita |
| 2 | Charles Darwin | 11 | Stanley Kubrick | 20 | Pozidono |
| 3 | Isaac Newton | 12 | Dante Alighieri | 21 | Moseo |
| 4 | Niccolo Machiavelli | 13 | William Shakespeare | 22 | Laozio (Lao Tsé) |
| 5 | Sokrato | 14 | J. R. R. Tolkien | 23 | Siddharta Gaŭtama, la Budho |
| 6 | Platono | 15 | Fernando Pessoa | | |
| 7 | Karlo Markso | 16 | Eça de Queiroz | 24 | Jesuo, la Kristo |
| 8 | Osama Bin-Laden | 17 | Luiz Vaz de Camões | 25 | Lazaro Ludoviko Zamenhof |
| 9 | Charlie Chaplin | 18 | Isaac Asimov | 26 | Victor Hugo |